Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 7 Julio, 2014

Kara Leganto, feliĉan Naskiĝtagon de ni kara IL, kiun ni festos la 26an de Julio!

Permesu al mi raporti pri la nia kutima ekster'eja kunveno en la arbara rezervejo, Ĉio, dank'al Dio, pasis glate (vd informon malsupre). Ne multaj partoprenis, sed multaj ĝuis. Bv veni fine de Julio, nia estimata s-ro prezidanto, d-ro Kordylewski revenas al sia E-hejmo. Ni salutu Lian revenon! Dankon pro la subteno. –La R.

ESF Plifortigas Ligojn kun Universitata Mondo

En junio, ESF bonvenigis en sian teamon d-ron Asya Pereltsvaig kiel parttempan stabanon kiu okupiĝos pri plifortigado de ligoj inter ESF kaj la universitata mondo. D-ro Pereltsvaig identigos fakultatanojn de nord-amerikaj universitatoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto-studoj kaj studoj kiuj tuŝas demandojn de internacia komunikado, lingvopolitiko kaj rilataj temoj, klopodante cadem tiun intereson kaj stimuli kreadon de kontaktoretoj inter ĉi tiuj universitatanoj, kaj dokumentante konatajn sciojn sur la kampo de Esperanto-rilataj studoj kaj sugestante traktendajn esplordemandojn. ESF jam faris komencajn paŝojn tiudirekten en la pasinteco, sed ĉi tiu nova posteno ebligos pli sisteman, pli fokusitan aliron. Pro la riĉa cademia fono de d-ro Pereltsvaig, inkluzive ŝian imponan esplorkarieron kaj ampleksajn kontaktojn kun kleruloj en multaj lingvo-rilataj kampoj, ŝi estas ideala persono helpi ESF-on pri ĉi tiuj klopodoj.

Asya Pereltsvaig estas prelegisto pri lingvistiko en la Universitato Stanford (Usono), kie ŝi instruas kursojn pri sintakso, ĝenerala kaj historia lingvistiko, kaj mondolingvoj. Ŝi ricevis doktoran diplomon pri lingvistiko de la Universitato McGill (Kanado) en 2002, kaj antaŭe instruis en la universitatoj Yale, Cornell, kaj pluraj eŭropaj universitatoj. Ŝia esplorado fokusiĝas pri la sintakso de slavaj, semidaj kaj tjurkaj lingvoj. Ŝi aŭtoris la libron Copular Sentences in Russian. A Theory of Intra-Clausal Relations, eldonita de la eldonejo Springer in 2007, kaj plurajn ĵurnalajn artikolojn kaj libroĉapitrojn.

Pli lastatempe, Asya Pereltsvaig plivastigis siajn interesojn al geografio, historio, kaj genetiko rilataj al lingvogrupoj ĉirkaŭ la mondo. Ŝia lasta libro, Languages of the World: An Introduction estis eldonita de la Universitata Eldonejo de Kembriĝo en 2012. Krome, ŝi kunaŭtoris la libron The Indo-European Controversy: Facts and Fallacies in Historical Linguistics kun geografo Martin W. Lewis (Universitato Stanford), eldonota de la Universitata Eldonejo de Kembriĝo en 2014. Cetere, Asya Pereltsvaig instruas lingvistikajn kursojn en pluraj institucioj de dumviva edukado en la Golfa Regiono (en Kalifornio) kaj blogas ĉe LanguagesOfTheWorld.info pri la geografio kaj diverseco de homaj lingvoj. *–ESF*

Krimeo – Adiaŭa Letero al Ukrainio

Multaj el vi jam scias pri la hororaj agoj de T. N. "Frateca" Moskovio en la sendependa Ukrainio. Jam estas proponata korespondado inter Krimeo (filo) lak Ukrainio (patrino). La 16-an de Marto, 2014:

"Mi foriras… Ĉu Vi pensis, ke Mi ŝercis, aŭ nur estis ofendinta? Ne, Mi probable simple komprenis, ke Mi ne povas esti kara perforte, kvankam Mi longe penis esti utila al Vi. Mi varmigis Vin per mia suno, ĉirkaŭlavis per la varma maro, kaj ĉiam treege atendis vian viziton...

Vi venis en la domon ne viŝante Viajn piedojn, indikante kion Mi devas fari, kiel pensi, kiel paroli, kiun imiti, sed pri la vojo, vivanta de Mi, ne estis interesata de Vi. Vi simple dum la 23 jaroj mortigis min, Vi mortigis Miajn ĝardenojn, arbarojn kaj parkojn, Vi kripligis miajn bordojn, Vi fortigis Min elpremi la lastajn gutojn de Mia turisto, ĉar kiam somero finiĝis, Mi fariĝas bezonata al neniu, precipe al Vi.

Kaj tamen, Mi suferis, Mi esperis, ke iun tagon...

Vi sciis, ke Mi mortas, sed anstataŭe de oksigena masko, Vi kaptis min je la gorĝo. Sed Mi ne koleras, Mi simple foriras. Mi ne povas foriri sola, ĉar oni ne povas spekti, kiel Vi mortigas miajn fratojn...

Mi iomete ekkaptos la spiron, nur iomete, kaj forprenos Ilin ĈIUJN. Ukrainio, ne pensu malbone pri mi: Mi amis Vin, sed Vi ne volas fariĝi patrina, tiel Mi iras hejmen, al Mia hejmo. Jam ne Via. Krimeo."

Daŭrigota: Respondo de Ukrainio aperos en la sekvanta n-ro de Saluton!

Marjorie Boulton – 90 jara! (E-poezio-5)

M. Boulton (n. 1924) Anglino. Verkistino en la angla kaj esperanta lingvoj. De 1948 instruistino kaj 1962-70 estrino de instruistina seminario. Lektorino pri anglaj lingvo kaj literaturo, doktoriĝis en 1976. Esperantisto de 1949. Ŝi verkis dudekon da libroj en la angla kaj esperanta lingvoj, interalie faman anglalingvan biografion pri Zamenhof. Ŝiaj esperantaj verkoj ampleksas ĉiujn literaturajn specojn, de la liriko kaj la proza rakonto ĝis dramo kaj eseoj. Verkis artikolojn pri diversaj temoj kaj eseojn precipe pri literaturo. Marjorie Boulton havas ne nur mirinde eminentan formtrovan talenton, sed ankaŭ intenson, emfazon kaj sinceron, unike kuraĝan, humanisman varmon. Akademiano. Katamiko. Movade aktiva nacie kaj internacie, direktis la kursojn en Barlastono, instruis en Grezijono, Kvinpetalo, Lesjöfors k.a.

Venuso kaj Vulkano *de Margorie Boulton ©1957*

Sub Etno la forĝejoj muĝe flamis.
Venuso kuŝis, la nudeco lumis.
Vulkano staris apud ŝi. Li lamis.

Distanco vibris kvazaŭ ŝnuroponto,
lin mokis lia propra impotento.
Ranco ekgustis sur la lang' pro honto.

Li tusis, turnis sin, kaj marŝis for.
Ŝi, freŝa kiel la naskinta mar'
ankoraŭ blandi en invita glor'.

Ŝi povis doni la purpuran rozon,
sintrovon, sinforgeson kaj ekstazon,
venkantan cedon, vekon kaj ripozon.

Vulkano iris sub la monton, blovis
forĝejon; staris apud ĝi kaj revis.
Poste li faris kion li ja povis.

Li fosis, trovis novajn mineralojn
ordonis raŭke: "Svingu la martelojn!
Mi senflorigos multajn molajn valojn!"

Skatoloj mortoplenaj staris are:
eksplode, brule, vente aŭ kancere
mortigi . . . li potencos senkompare.

L' armisto de la dioj ekridetis:
malvarmajn, hokajn manojn li kunfrotis,
brilaj skatoloj sub la monto pretis.

Venuso dormis en beleco flama.
Sub Etno, ekfeliĉe memestima,
staris Vulkano, impotenta, lama.

Pasintaj

Nia lasta, la piknika kunveno okazis en la kutima loko – Schiller Parka arbara rezervejo. Kuniris pli ol 10 homoj, multaj familianoj (kiel ekz., Gregoro Dolgin venis kun edzino, filino kaj nepino). Ekde dekomence ni estis iom ĝenaj pro la ĉeesto de multaj ne E-parolantoj, sed poste, kiam restis elefantoj de la ŝikaga E-movado, nia konversacio fluis en la perfekta (!, mi ne timas tiun vorton kaj takson) vere internacia direkto. Krom la pens-iterŝanĝon, ni ĝuis rostigitan viandon, kolbasojn, bertorton ktp. Niaj najbaroj, festintaj apude, demandis nin pri la parolata lingvo. La respondo estis ununure sola – la Internacia lingvo! Bedaŭrinde, pro la streĉita situacio en Ukrainio kaj ega politika aktiveco ne partoprenis fratoj-boksistoj Kliĉkoj. Kvankam tio ĉi ofte okazis kun politikistoj, ni dankas al ili pro la subteno de nia E-movado. Denove, dankon al ĉiuj partoprenintoj!

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

22an de Julio – perelegos vic-prezidanto Randio (pri la tute sekreta temo)

26an de Aŭgusto – Impresoj de la somero (raportos dezirantoj)

La Adreso: 1350 N. Wells St., Ŝikago. Apudas Stacioj: Sedgwick (Bruna linio) kaj Clark/Division (Ruĝa linio). Por Senpaga Parkejo, telefoni al Viktoro: 773-344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵon (dolĉakvon, bieron, vinon ktp)!